话筒

# Mikrofone

(Januare-Marte, 2007)

**Novjara mesaĝo de Wang Gengnian, direktoro de ĈRI**

**Plensukcese fermiĝis la du Sesioj**

**Vizito al Imperiestra Palaco**

**Nova retejo por nova jaro**



CRI 中国国际广播电台世界语部
Esperanto-redakcio de ĈRI

N.17

# Enkonduko



Mi tre ĝojas, ke finfine la 1-a numero de nia kuriero Mikrofone en la nova jaro aperas kun nova fizionomio! Jam en la pasinta jaro mi kaj miaj kolegoj diskutis pri la ebleco aperigi nian kurieron gazetforme. Post klopodo ni sukcesis! Jen nia nova Mikrofone, kiun vi tenas en la mano: Ĝi ne plu aspektas tia, kia ĝi estis de sia ekapero en la komenco de 2003 ĝis la lasta numero en la fino de 2006.

Ni eĉ pensis pri ŝanĝo de la titolo de nia kuriero, por ke ĝi estu tute nova gazeto inter niaj redakcio kaj aŭskultantoj, sed fine ni forigis la intencon, konsiderante, ke dum la pasintaj 4 jaroj Mikrofone donis tiom da impresoj al niaj karaj aŭskultantoj, kiuj verŝajne ne volontas ĝin forlasi; kaj ankaŭ pro tio, ke ni ja ne povis trovi titolon pli taŭgan kaj pli belan.

Ni do decidis, ke nia kuriero restu Mikrofone, por ke ĝi ludu plu rolon de ligilo inter ni kaj niaj aŭskultantoj. Portempe ĝi ankoraŭ estas trimestra, tamen ni esperas, ke en la proksima estonteco ĝi fariĝu periodaĵo du-monata, eĉ monata!

Vi scias, ke nia Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia komenciĝis en 1964. Pli ol 40 jaroj pasis kaj nia Esperanta disaŭdigo pli kaj pli prosperas, precipe de la lastaj jaroj. En la 1-a de majo, 2002, ni komencis nian surretan disaŭdigon. Nun ni faras renovigon al nia reto, kiu entenos blogon, podkaston kaj aliajn modernajn elementojn. Ni probable fondos en nia Esperanto-reto Konfuzian Instituton, kiu celas instruadon de la hana lingvo kaj disvastigadon de la ĉina kulturo. Ni ja havas grandiozan projekton por nia estonta laboro, sed plej grave estas, ke ni bezonas viajn helpon kaj subtenon. Niaj Mikrofone kaj disaŭdigo perdus la bazon por daŭre ekzisti, se ni ne plu havus vin, kiel legantojn kaj aŭskultantojn. Ĉiam memoru bonvole, ke nia redakcio apartenas ne nur al Ĉina Radio Internacia, sed ankaŭ al vi kaj la tutmonda esperantistaro!

Kore salutas,



*Jianping Zhao*

# Invito al artikolpeto

Karaj legantoj! Venontjare kvin-jariĝos nia Mikrofone. Dank' al viaj plenforta subteno kaj aktiva partopreno en la kuna redaktado, Mikrofone senĉese pliboniĝas ĉiuflanke kaj sin trovas jeso kaj ŝato de la legantoj. Por kontentigi bezonon en komunikado inter ni kaj niaj legantoj, Mikrofone aperas en la formo de gazeto.

Celebre al la kvin-jariĝo, ni aranĝos artikolpeton de aprilo ĝis venonta marto kun la titolo: "Nia Mikrofone". Viaj impresoj, kortuŝaj rakontoj, poemetoj, fotoj, sugestoj kaj espero pri Mikrofone estas bonvenaj. Ni juĝe elektos ses gajnintojn de la unua, dua kaj tria premioj kaj sinsekve publikigos ĉiujn eminentajn kontribuaĵojn en Mikrofone. Ni esperas, ke dank' al nia komuna klopodado, Mikrofone estos pli plaĉa al niaj legantoj en la dua jarkvino.

Ni atendas vian fervoran partoprenon!



# Plensukcese fermiĝis la du Sesioj





Post plensukcesa plenumo de ĉiuj procezoj, fermiĝis la 5-a Sesio de la 10-a Tutlanda Popola Kongreso kaj tiu de la 10-a Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, okazintaj marte en Pekino. La okazigo de la du Sesioj estis granda afero en politika vivo de la ĉina popolo. Tiu ĉi grava evento vekis altan atenton ne nur de ĉinoj, sed ankaŭ de eksterlandaj amaskomunikiloj, kiuj volas konkrete scii: En kiu direkto Ĉinio iros? Ankaŭ niaj aŭskultantoj montris grandan interesiĝon pri la du Sesioj. Antaŭ okazigo de la Sesioj, ĝenerala sekretario de Pakistana E-Asocio, Jawaid Eahsan sendis gratulon kaj bondezirojn. Krome, Prezidanto de UEA, Renato Corsetti, pola amiko Andreo Pettyn, Henri Masson el Francio kaj aliaj elmetis demandojn pri medioprotekto, opono kontraŭ korupteco, starigo de Konfuziaj Institutoj, naskolimigo kaj la de ili zorgataj temoj.

Dum la Sesio de la Popola Kongreso, ĉina ĉefministro Wen Jiabao faris raporton pri la registara laboro, kiu estis juĝata de la publiko kiel raporto favora al la popolo. Ni citas kelkajn gravitojn, interesatajn de niaj legantoj.



En la raporto, resumante la pasintjarajn laborojn, ĉefministro Wen Jiabao faris ĝeneralan dispozicion de estontaj laboroj pri la problemoj pri agrikulturo, kamparo kaj kamparanoj, medioprotektado, perfektigo de la sistemo por puni koruptitojn kaj preventi koruptadon kaj starigo de honesta registaro kaj tiel plu.



En sia raporto, Wen Jiabao faris eksplikadon ankaŭ pri ekster-aferaj politikoj de Ĉinio, problemoj pri Hongkong, Aomen kaj Taiwan kaj aliaj.

Post fermo de la Sesio de la Tutlanda Popola Kongreso en la 16-a de marto, okazis gazetara konferenco, en kiu ĉefministro Wen Jiabao faris respondojn al la demandoj rilate al popola vivo, batalo kontraŭ korupto kaj aliaj, elmetitajn de ĵurnalistoj en- kaj eksterlandaj.

Pri problemo de la popola vivo, Wen Jiabao diris, ke Ĉinio jam nuligis la agrikulturan imposton, realigis la 9-jaran devigan edukadon, kaj speciale publikigis leĝojn ĉi-rilatajn. Krome Ĉinio baldaŭ efektivigos la sistemon pri minimuma vivgarantio en urboj kaj la kamparo. Pri problemo de korupto, Wen Jiabao akcentis, ke kontraŭ la korupta ago, Ĉinio laŭleĝe faras severan punon sen konsideri, al kiu ĝi rilatas, kaj en kiu kampo ĝi okazas.

De la raporto kaj la gazetara konferenco, oni povas facile rimarki, ke Wen Jiabao estas ĉefministro plene memfida, malproksimvida, efektive praktikema kaj popolzorgema. Li ne kontentiĝas pri la nunaj sukcesoj kaj progreso, sed konsideras en la bona situacio pri danĝeroj de estonta disvolvo de Ĉinio.

# Novjara mesaĝo de Wang Gengnian, direktoro de ĈRI



Ĉe la komenco de la nova jaro, en la nomo de ĉiuj oficistoj kaj laborantoj de Ĉina Radio Internacia, sinjoro Wang Gengnian, dissendis novjaran mesaĝon. Jen la citita mesaĝo:

"Karaj aŭskultantoj kaj amikoj, okaze de la alveno de la nova jaro 2007, mi, en la nomo de ĉiuj miaj kolegoj, adresas el la ĉina ĉefurbo Pekino sincerajn bondezirojn kaj elkoran saluton al vi. Feliĉon, sukceson, sanon kaj ĉion bonan!

"Antaŭ nelonge ĈRI okazigis grandiozan celebradon por sia 65-jariĝo. En la soleno partoprenis 500 honoraj gastoj, ĉinaj kaj alilandaj, ankaŭ 15 aŭskultantoj gajnintaj la specialan premion el la konkurso 'Mi kaj Ĉina Radio Internacia'. Daŭras la festeca plezuro, tiom pli pro la alveno de la nova jaro. Retrospektive, en la kapo ondas ĝojo kaj fiero; perspektive al la jaro 2007, el la koro leviĝas espero, aspiro kaj revo.

"En la daŭro de 65 jaroj, ĈRI sin impone disvolvadis. Kaj la jaro 2006 estas tiom pli eksterordinara. Ĝi ne nur resumis la paseojn, sed ankaŭ komencis novan periodon. En la jaro 2006 ni ricevis sume pli ol 2 milionojn kaj 400 milojn da leteroj de niaj aŭskultantoj, tiel ke la korespondado atingis novan nivelon.

"La jaro 2006 abundis je fruktoj rikoltitaj de ĈRI, ankaŭ je laŭdindaj kaj admirindaj progresoj. La jaron brile ĝermigis frekvencomodulada radiostacio en Najrobio kaj superbe kronis simila radiostacio en Vjentiano. En la estonteco ni rapidigos konstruadon de frekvencomoduladaj radiostacioj, por ke pli kaj pli multaj landoj kaj urboj klare aŭdu la voĉon de Ĉinio kaj, siaflanke, Ĉina Radio Internacia frue fariĝu unu el la plej influivaj amaskomunikiloj en la mondo."



# Novjaraj bondeziroj de niaj aŭskultantoj

Okaze de la Kristnasko kaj Novjaro, aŭskultantoj el diversaj landoj sendis al ni leterojn, kalendarojn kaj belajn poŝtkartojn, esprimante salutojn kaj bondezirojn.



***Jindřich Tomíšek*** (Ĉeĥio) :

Mi kore salutas vin ĉe la jarŝanĝo kaj deziras al vi – al ĉiuj redakcianoj prizorgantaj E-elsendojn de Ĉina Radio Internacia firman sanon, feliĉon, viventuziasmon kaj multajn sukcesojn en via poresperanta agado en la tuta Nova Jaro 2007! Mi tre ĝojas, ke en 2006 la E-redakcio de ĈRI akiris grandan sukceson en pliriĉigo de la programo, redaktado de Mikrofone kaj aliaj laboroj. Post la bedaŭrinda definitiva ĉeso de regulaj ĉiutagaj E-elsendoj de Pola Radio, ĈRI denove restas sola radio en la mondo kun ĉiutagaj E-elsendoj, mi do esperas, ke via agado eĉ pli progresos por altiri ĉiam pli multajn aŭskultantojn kaj kunlaborantojn kaj tiucele kontribuos al prosperigo ne nur de viaj elsendoj, sed ankaŭ de nia E-movado en la mondo!

***Kornelia Nagy*** (Hungario), nome de la medicina fakgrupo de Budapeŝto:

Novaj taskoj de la nova jaro nin ŝarĝas, solvu la lingvoproblemon per nia komuna lingvo Esperanto." En sia dankesprimo Kornelia skribis:

...Vian helpon mi ĉiam sentas,
Miajn paŝojn vi direktas,
Vi tenas malfortan manon,
Ricevas de vi bonagojn.

Dankon por la sciigo,
Kiu venas el Radio.
Diverslingva la problemo,
Tre bonega la enhavo!

Esperanto nin kunligas,
Pere de ĝi ni riĉiĝas,
Akceptas, sendas mesaĝon
Kaj atingas la tutan mondon…

***Tobias Meissner*** (Germanio):

Al vi ĉiuj antaŭ kaj malantaŭ la mikrofono mi deziras ĝojigan Kristnaskon kaj sanan, ĝojplenan, prosperan Novan Jaron.

***Beatrice & Michel Alle*** (Francio)
La tero estas nia patrujo kaj la homaro, nia familio. Solaj, ni povas fari nenion, sed kunaj ni povas ŝanĝi la mondon!
*(Ni esprimas koran dankon kaj reciprokas la samon al ĉiuj membroj de la familio. Jen la admirinda granda familio de Beatrice Alle feliĉa kaj harmonia.)*

***Attila Makay*** (Rumanio)

En la nomo de la aŭskultantoj de nia loka grupo kaj la Esperanto Asocio Oradea, mi deziras al vi feliĉan Novan Jaron, bonan sanon kaj prosperon!



Ni dankas vin pro la informoj el la radio kaj "Mikrofone", kiuj riĉigas niajn konojn pri via bela lando kaj brava popolo.

***Manuel Jose Pinguinha*** (Portugalio):

Mi tre deziras al ĈRI bonan futuron kaj ke neniam okazu al ĝia Redakcio simila afero, kiel okazis al la E-Redakcio de Pola Radio.




Novjarajn bondezirojn al ni sendis ankaŭ Osmo Buller kaj aliaj kolegoj de la Centra Oficejo de UEA, Agim Peraj, prezidanto de Albana Esperanto-Ligo, Livia Barth kaj Abel Weiner el Argentino, Leopold Patek el Aŭstrio, Marc Cuffez kaj Antoon Afschrift el Belgio, Alice Amalia Klein, Josefo Pasero, Jose Pardal da Silva kaj Braulio Garcia el Brazilo, Angel Ivanov Maglov kaj Konstantin Kacerov el Bulgario, Helena Maudrova, Jiri Patera, Karel Laŝtovic, Viktor kaj Libuŝe Dvorak kaj Peva Houdova el Ĉeĥio, Elin Lokk el Estonio, Hannu Kiiski el Finnlando, Chalm Alain, Raymond Bore kaj Monsieur Andre Maurice el Francio, Anton Kronshage, Adalbert Masuhr kaj Gerd Muller el Germanio, Santiago Torne el



Hispanio, Ludviko Donat kaj Donat Bognar el Hungario, Mario Amadei kaj Arcangelo Tartaro el Italio, Koji Yamda, Mitsunori Kawazoe, Osaki Hiroshi, Tadacuna Nomra kaj Takehana Tosikazu el Japanio, LEE Chong-Yeong el Korea Respubliko, Raymond Fonseca el Kubo, Saulcerite Neilande el Latvio, Antanas Gvildys el Litovio, Alicja Zwolinski, Henryk Zygowski, Jan Klocek, Jerzy Dryja, Kazimierz Krzyzak, Marian Laba, Urszula Mokrzycka, Zbyszek Stapiński kaj Zenon Bartocha el Pollando, Can Zamur el Turkio kaj multaj aliaj. Ni kore dankas ĉiujn gratulintojn kaj reciprokas la samon al ili kaj ĉiuj aŭskultantoj.





# Vizito al Imperiestra Palaco

Pekino, antikva, bela kaj fama historia urbo, estas unu el la 6 grandaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Ĝis nun ĝi konservas en si multe da kulturaj relikvoj kaj antikvaj vidindaĵoj, cirkulas pri ĝi multaj mirindaj legendoj. Iu legendo diras, ke en la pra-a tempo, Pekino estis amara maro kaj nomata "Youzhou de amara maro". En la amara maro loĝis feroca drako, kiu turmentadis la popolanojn, tiel ke ili aŭ mortis aŭ forfuĝis aliloken. Poste la feo Nezha konkeris la drakon, fermis la drakan paron en groton de Norda Maro, kaj starigis sur la groto altan blankan pagodon. De tiam la lokanoj unu post alia revenis al la hejmlando, sekve iom post iom formiĝis tie vilaĝoj kaj urbetoj, fine aperis la regiono nomata Youzhou.

En la periodo de Militantaj Regnoj ( 475 a.K – 221 a. K ), la regno Yan la unua starigis sian ĉefurbon ĉi tie, kaj ankaŭ pluraj sekvantaj dinastioj prenis tiun ĉi lokon kiel la ĉefurbon. La imperiestro Chengzu de la dinastio Ming translokis la ĉefurbon de Nankino al ĉi tiu loko, kaj nomis ĝin "Beijing". Ankaŭ la dinastio Qing prenis Beijing kiel sian ĉefurbon, sed ŝanĝis ĝian nomon kiel "Jingdu". Ekde la dinastioj Ming kaj Qing, Beijing ĉiam estas la politika kaj kultura centro de la tuta lando.



En la centro de Beijing sidas ore brilanta palaca ensemblo, jen estas la Imperiestra Palaco – loĝejo de sume 24 imperiestroj de la dinastioj Ming kaj Qing. Ĝi estis la monde plej granda imperiestra palaco. Origine ĝi nomiĝis "Malpermesita Urbo". En la feŭdisma socio, la imperiestro estis la nesuperebla monarko. Ties palaco estis ĉirkaŭata per altaj muroj, kompakte gardata kaj absolute malpermesis al ordinarulo alproksimiĝi, pro tio ĝi estis nomata Malpermesita Urbo. Antikvuloj opiniis, ke la dio loĝas en la ĉiela palaco nomata "Purpura Palaco"; la feŭdisma



imperiestro sin nomis "filo de la ĉielo", tial lia loĝejo devas esti sama kiel la Purpura Palaco en la ĉielo, pro tio la Imperiestra Palaco estis nomata ankaŭ "Purpura Malpermesita Urbo".

La Imperiestra Palaco estas antikva ensemblo plej bone kaj perfekte rezervata en Ĉinio. Ĝi okupas la areon de 720 mil kvadrataj metroj kaj ĝia konstrua areo estas 150 mil kvadrataj metroj. Ĝi konsistas el dekoj da kortoj grandaj kaj malgrandaj kun pli ol 9 mil ĉambroj diversspecaj. Se iu tranoktus en ĉiu ĉambro de la palaco unufoje ekde sia naskiĝo, do kiam li tranoktos en la lasta ĉambro, li jam estos 27-jara junulo. Ĉirkaŭ la Imperiestra Palaco staras palaca muro alta je pli ol 10 metroj kaj longa je 3 kilometroj, kaj fluas ankaŭ urbogarda rivero larĝa je 50 metroj. La Imperiestra Palaco havas 4 pordojn, la suda estas pordo Wumen, la norda estas pordo Shenwu, la orienta estas pordo Donghua kaj la okcidenta estas pordo Xihua. Ĉe la kvar anguloj de la palaca muro staras kvar angulaj turoj.

La angulaj turoj de la Imperiestra Palaco estas delikataj kaj eksterordinaraj konstruaĵoj, ĝenerale ĉiu kun 9 traboj, 18 kolonoj kaj 72 firstotraboj. Legendo diras, ke la imperiestro Chengzu de la dinastio Ming en dormo sonĝis angulan turon kun 9 traboj, 18 kolonoj kaj 72 firstotraboj, kaj opiniis ĝin belega. Vekiĝinte, la imperiestro ordonis metiistojn konstrui la turon tute saman kiel tiu en lia sonĝo. Tamen, ĉiu angula turo konstruita de ili ne plaĉis al la imperiestro. La metiistoj ĉiuj estis ĉagrenataj pro senelirejo. Iun tagon, subite aperis iu oldulo vendanta cirtofilojn. Tenante delikatan kaĝon, la oldulo ofertadis siajn cirtofilojn.

La delikata kaĝo vekis atenton de metiistoj. Ili trovis, ke la kaĝo ĝuste havas la strukturon de 9 traboj, 18 kolonoj kaj 72 firstotraboj. Kiam la metiistoj konsciis, ke eble la oldulo estas metiarta majstro Lu Ban, kiu speciale venis por orienti ilin, la oldulo tamen abrupte malaperis. Imitante la strukturon de la kaĝo de la oldulo, la metiistoj sukcesis konstrui la angulan turon. Jen estas la origino de la angula turo.

La tuta ensemblo de la Imperiestra Palaco estas simetrie dispoziciita laŭ la centra akso, kun bonorda aranĝo kaj elstara reliefigo de la ĉefa parto. Kun la pordo Qianqing kiel limo, la Imperiestra Palaco dividiĝas en du partojn antaŭan kaj malantaŭan. La centro de la antaŭa parto estas la haloj Taihe, Zhonghe kaj Baohe, kie la imperiestro faris la instrukcion kaj okazigis solenajn ceremoniojn. La halo Taihe estas la plej grandioza palaco de la Imperiestra Palaco, kaj la imperiestra trono sidas ĉi tie. Kiam la imperiestro okazigis ceremonion, ektondris sonoriloj kaj tamburoj kaj la halo pleniĝis de la impona atmosfero. Ambaŭflanke de la centra palaco troviĝas simetrie du palacoj. En la malantaŭa parto de la Imperiestra Palaco estis kancelario kaj loĝejo de la imperiestro, kaj ses palacoj orientaj kaj okcidentaj ambaŭflanke estis loĝejoj de la imperiestra edzino kaj kromedzinoj de la imperiestro. La grandeco, alteco, formo kaj koloro de ĉambroj de la Imperiestra Palaco montras rimarkindajn diferencojn laŭ la rango kaj statuso de tieaj loĝantoj, tio spegulis la rigoran hierarkian koncepton de la feŭdisma socio.

La tuta ensemblo de la Imperiestra Palaco aspektas majesta, grandioza, luksa kaj impona, kaj estas kremo de la ĉina antikva arkitekturo. Ĝi koncentre enkorpigas la eminentan tradicion kaj karakterizan stilon de la ĉina antikva arkitekturo, manifestas la altan inteligentecon kaj kreivan kapablon de la antikva laboranta popolo de Ĉinio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Imperiestra Palaco estis grandskale riparita kaj malfermita al la vizitantoj en- kaj ekster-landaj. Nun la Imperiestra Palaco estas nomata Muzeo de Imperiestra Palaco.



# Celebre al la Printempa Festo













Ĉinoj ĵus pasigis sep feriojn de la Printempa Festo - la plej grava tradicia festo. Nun, dum la Festo ĉinoj havas ferion de sep tagoj. Okaze de la Festo, ĝenerale ĉiuj familianoj ĝoje kolektiĝas hejme el diversaj lokoj, amikoj vizitas unu la alian, sendas bondezirojn reciproke kaj infanoj petardas. Tio signifas, ke iras vintro for kaj baldaŭ venos la ora sezono – Printempo.

Bonvenigante alvenon de la Festo, diversaj departementoj de Ĉina Radio Internacia okazigis sinsekve diversforman celebradon. Jen la koruso de E-Redakcio en la amuzkunveno renkonte al la Printempa Festo.



Ankaŭ multaj kolegoj de nia Redakcio forveturis el Pekino por ĝoje pasigi la Feston kune kun siaj gepatroj kaj aliaj familianoj. Nun ili jam revenis kaj sin ĵetis en streĉan laboron.

Nun la celebrado okazas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en diversaj landoj de la mondo, kie laboras kaj vivas elmigrintaj ĉinoj.

Okaze de la Festo, Livia Barth el Argentino, gefratoj Ivan Budinov el Bulgario, Tobias Meissner el Germanio, prezidanto de UEA Renato Corsetti el Italio, Joop van der Hoeven el Nederlando, Galina Bahtereva kaj Tatjana Loskutova el Rusio, Le Thien Tuong el Vjetnamio kaj mulaj aliaj speciale sendis al ni gratulkarton kun bondeziroj. Ni kore dankas ĉiujn bondezirantojn kaj reciprokas la samon al ĉiuj niaj aŭskultantoj en la mondo.

## Jibilea Koncerto de Ĉinio en Aŭstrio

Leopold Patek el Aŭstrio informis, ke renkonte al la ĉina tradicia Printempa Festo, Ĉina Nacia Orkestro Huaxia okazigis ĉinan Nacian Koncerton en la Ora Salonego de la Muzika Asocio de Aŭstrio. De 1998, Ĉinio jam dekfoje okazigis tian koncerton en Vieno.

Krome li sendis al ni ankaŭ kompaktan diskon de Novjara Koncerto, 2007. Koran dankon al Leopold Patek!

## Ĉina Printempa Festo en Brazilo

Laŭ informo de Paulo Nascentes el Brazilo, en la 4-a de marto la Ĉina-Brazila Kultura Asocio organizis en la Placo de Universala Harmonio de Brazilio, belegan kulturan feston kadre de la Ĉina Novjaro. Dum la festo oni prezentis al la publiko ĉinajn tradiciajn uŝuon, tajĝiĉuanon kun partopreno de ĉirkaŭ 2 mil homoj el diversaj asocioj kaj akademioj de Brazilo kaj aliajn. La festo plene spegulis bonajn amikajn kunlaborojn inter Ĉinio kaj Brazilo.

# Fondiĝis la alia Kleriga Bazo

## Fondiĝis la alia Kleriga Bazo de Esperanto en la provinco Liaoning

En januaro, 2007, Esperanto-Asocio de la provinco Liaoning sankciis la peticion pri fondiĝo de Kleriga Bazo de Esperanto en Yilin-Lernejo de Fremdlandaj Lingvoj en la urbo Wafangdian.Tio estas la dua kleriga bazo de Esperanto de la provinco post la bazo por altlernejoj en Shenyang-a Muzika Universitato en la pasinta oktobro.

La 14-an de januaro, 2007, 15 geknaboj de elementaj lernejoj komencis lerni Esperanton en la unua kurso de la bazo. Tio signifas komencon de la Esperanto-instrua Jaro de la provinca asocio en 2007. Nun oni streĉe laboras por funkciigi aliajn E-kursojn en kelkaj universitatoj de la provinco.

***- Wu Guojiang kaj Wang Yun***



Parto de la geknaboj de la E-kurso

## 20 jaroj de Baotou-a E-Asocio



La celebra kunveno

Celebre al la 20-jariĝo de Baotou-a E-Asocio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, la 15-an de decembro, 2006, okazis solena memorkunveno. En pasintaj 20 jaroj, precipe en la lastaj jaroj, la Asocio okazigis diversnivelajn kursojn, plifortigis kontakton kun E-organizoj en- kaj eksterlandaj kaj akcelis rapidan disvolvon de la loka E-Movado.

***- Chang Haiyan***

## Estas definitive nuligita la E-elsendo de Pola Radio

Ekde la 16-a de decembro, 2006, E-Redakcio de ĈRI restas denove la sola radio kun ĉiu-taga E-elsendo, ĉar la 15-an de decembro ĉesis la E-elsendo de Radio Polonia malgraŭ la klopodoj de UEA-prezidanto kaj la tutmonda esperantistaro.

Informiĝinte pri la principa decido de Pola Radio pri nuligo de la E-elsendo, ni ĉiuj ege maltrankviliĝis kaj esperis, ke dank' al grandskala subtenkampanjo, la estraro de Pola Radio ŝanĝos la decidon. Fakte en la subtenkampanjo la E-redakcio de Pola Radio ricevis pli ol 300 paĝojn da leteroj, direktitaj al koncernaj instancoj kaj petantaj konservi la elsendon. Leteroj de Universala Esperanto-Asocio al Pola Radio, al la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj kaj al la prezidento de Pollando restis sen respondo. Kaj kategorie ĉesis la Esperanta elsendo!

Ni ege bedaŭras pro la fina rezulto. Ni bone scias, ke ĉi-flanke s-ino Barbara Pietrzak kaj ŝiaj kolegoj de la E-Redakcio de Pola Radio kaj multaj esperantistoj, inkluzive de niaj aŭskultantoj, jam faris ĉiujn eblojn, sed vane! Feliĉe estas, ke laŭ plej freŝa informo de s-ro Leopold Patek el Aŭstrio, Radio Polonia povas daŭrigi la elsendojn, sed ne plu per radio-ondoj kaj satelito. Eblas aŭskulti la nunan 20-minutan programon nur per reto.

Ĉiuj membroj de la E-Redakcio de Pola Radio estas niaj kolegoj kaj bonaj kunlaborantoj. La du Radioj havas komunajn aŭskultantojn. Ni kune faris multe da efikaj laboroj por plivastigi Esperanton kaj akceli disvolvon de la internacia E-Movado. Ni kune okazigis kunsidojn de aŭskultantoj kaj faris intervjuojn en multaj Universalaj Kongresoj kaj interŝanĝis spertojn en radiolaboro. Ni esperas, ke la ĉesigo de la elsendo ne kaŭzos al ili deprimon, sed ili bonvole revigligu sian spiriton, daŭre energie aktivu en la monda Esperantujo kaj, se eble, kontribuu al la prosperigo de nia E-elsendo.



# Cititaj Leteroj – 海外飞鸿

## Mesaĝo de Sergeo Krayukhin el Rusio:

Mi proponas, ke la movado ĝenerale kaj UEA multe pli okupiĝu pri la grafikaj talentoj, kiujn ni havas.

Antaŭ pli ol dek kvin jaroj estis alparolo de UEA al ĉiuj esperantistoj kun peto proponi ideojn pri rimedoj aktivigi la lingvan disvastiĝon. Kiel profesiulo kaj spertulo mi povas certe konfirmi, ke al UEA kaj la tuta movado treege mankas vidaj reklamaĵoj. Ne estas sekreto, ke ĉiuj prosperaj organizaĵoj, kompanioj, kluboj, politikaj partioj neniam forgesas pri la reklamaĵoj. Videbla reklamo agadas pli rapide, pli rimarkeble, ofte pli efike.

Ial UEA neniam organizis konkursojn pri afiŝoj, bildkartoj, kalendaroj kaj esperant-libraj ilustraĵoj.

Se iu opinias, ke vidreklamo ne povas esti aktiva en la movado pro manko de mono, tiu eraras terure multe. Multfoje mi vidis kiel oni mendas por si presreklamon kaj poste sukcese vendas ĝin.

## Mesaĝo de Lucas Yassumura el Brazilo:

Mi estas aŭskultanto de viaj Esperanto-elsendoj jam de multaj jaroj, sed neniam antaŭe mi skribis al vi. Nun mi skribas al vi kun grandega ĝojo post aŭskulto de via programero de la 9-a de decembro, 2006. Aŭskultante la parton de "Esperanto-Simpozio en Hainan" en via programero. Dum multaj jaroj mi batalis por pli praktika uzado de Esperanto. Kaj jen surprizoj, kiam mi aŭdis la vortojn eldiritajn en la Simpozio en Hainan.

Zamenhof kreis la lingvon por ĉiuj kaj por ĉio. Tion li mem asertis dum siaj multaj paroladoj. Do kial ni, esperantistoj, ne povas honeste profiti el Esperanto, kiu estas ege potenca lingvo por komerco, turismo, scienco, tekniko, inter multaj aliaj kampoj? – Tio ja estas grava demando.

Post via programero, mi sentas, ke miaj demandoj ĉi-rilate estas iel respondataj! Vi, la nobla ĉina popolo, konkretigas revon per la uzo de nia kara lingvo en praktikaj aferoj de la vivo.

Mi nur devas gratuli vin! Mi ankaŭ devas gratuli ĉiujn kuraĝajn partoprenantojn de la Esperanto-Simpozio de Hainan, ĉar paroli pri praktika uzado de Esperanto preskaŭ fajrigas tabuon. Sed vi ne timas; vi iras antaŭen kaj tio emociis min. Kiel esperantisto, kiu konscias pri la ege potenca forto de Esperanto, mi apogas vin. Iru antaŭen! Mi kredas je viaj fortoj!

## Mesaĝo de Leopold Patek el Aŭstrio:

De la 13-a de decembro, 1981, ĝis la 8-a de marto, 1982, E-Redakcio de Ĉina Radio Internacia estis la sola redakcio kun ĉiu-taga E-elsendo, tiam Radio Polonia ne povis elsendi E-programon pro la milita stato.

Ekde la 16-a de decembro, 2006, E-Redakcio de ĈRI estas denove la sola kun ĉiu-taga E-elsendo, ĉar la lasta E-elsendo de Radio Polonia estos aŭdiĝanta la plej proksiman vendredon, tio estas la 15-an de decembro.

*(Ni ĝojas, ke Leopold Patek konservas en sia notlibro pri aŭskultado tiel valoran materialon en frua tempo de nia elsendo. Ni kredas, ke Leopold Patek ne estas la sola inter la aŭskultantoj, kiuj havas aŭskultarkivon, tenante valoran materialon. Koran dankon al tiuj fidele zorgemaj aŭskultantoj.)*

## Mesaĝo de Albert Reiner el Aŭstrio:

Multan dankon pro via grandanima donaco kaj atestilo pri gajno de la tria premio en la konkurso "Mi kaj Ĉina Radio Internacia"! Kiam mia patrino vidis la belegan ŝalon, ŝi multe laŭdis la kvaliton de la materialo kaj la belecon de la koloroj. Ankaŭ via diplomo certe estos bone gardata ero en mia kolekteto de sendaĵoj, kiujn mi jam ricevis de via redakcio…

Fine mi ankaŭ volas mencii unu plibonigon de viaj elsendoj kiu aparte plaĉas al mi, nome, regule elsendi kelkajn Esperantajn informojn fine de la novaĵoj.

## Mesaĝo de Petik Janos el Hungario:

La ricevo de viaj disaŭdigoj mezondaj en Albanio kaŭzis al mi pli da ĉagrenoj kaj fine mi rezignis foje-refojan kapton.

Samtempe, la politika situacio de via lando, la kulturo de via popolo, via ĉarma muziko min daŭre interesas. Kiel komuniston, min tre interesas pleje nur la demando: "Ĉu la gvidantoj de via lando havas sufiĉe da rezist-kapablo kontraŭ la allogoj, prezentataj de la 'glora okcidenta mondo'?" Mi deziras ankaŭ al vi portadi kaj alte tenadi la torĉon de la ideo de socialismo.

## Letero de Jorma Toropainen el Finnlando:

…Mi dankas vin pro viaj elsendoj, kiuj estas pli kaj pli gravaj por Esperanto-Movado, precipe nun, kiam oni nuligis la E-elsendojn de Pola Radio! Mi samopinias kun Renato Corsetti, ke via lando per radiaj elsendoj akiros pliajn amikojn. Same mi persone estas kontenta, ke helpe de viaj elsendoj mi konas pli kaj pli viajn landon kaj popolon. Mikrofone estas tre utila kaj bone kompletigas la aŭskultadon.

## Letero de Jiri Patera el Ĉeĥio:

…Tre grave estas, ke viaj programoj estas ĉi tie en Eŭropo bone aŭdeblaj. Nun, kiam la elsendo de Pola Radio ne troviĝas sur la mallongaj ondoj, kiam Radio Roma kaj Radio Vatikana vintre ne estas bone aŭdeblaj, tiam via kurtonda elsendo estas eble la sola elsendo ĉi tie.

Tre bela estas la nova numero de Mikrofone, kies unuan paĝon ornamas koloraj bildoj kun la ĉefartikolo honore al la 65-jariĝo de la ekzisto de Ĉina Radio Internacia. La salutoj kaj gratuloj de ŝtatestroj kaj aŭskultantoj substrekas la gravecon de tiu radio-institucio, kiu ĉiu-tage tra la mondo disponigas al siaj aŭskultantoj informojn pri Ĉinio kaj prezentas vastan kaj buntan bildon pri la progreso de la nuntempa Ĉina Popola Respubliko.

## Mesaĝo de Paulo Nascentes el Brazilo:

Unio Planeda brazila dankas kaj gratulas al Ĉina Radio Internacia pro ĝia grava poresperanta laboro. La disvastigo de la jarmila altvalora ĉina kulturo inter brazilanoj per niaj asociaj televidkanaloj daŭre estos nia laboro. La estraro de la Unio intencas montri aliajn kulturajn televidprogramojn kaj laŭeble ricevos taŭgan kvanton de la Bulteno Mikrofone (oktobre-decembre, 2006) fare de Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia.

## Mesaĝo de Agim Peraj, prezidanto de Albana Esperanto-Ligo:

…Kvankam Pola-Radion subtenis ni ĉiuj, tutaj esperantistoj, tamen ne sukcesis konservi la E-elsendojn en Varsovio; vi jam estas voĉo ne nur de Ĉinio al la mondo kaj de la mondo al Ĉinio, sed ankaŭ de mondaj esperantistoj...

Se UEA parolas "skribe", vi parolas "voĉe", vi estas nia "voĉo"!

*(Kun ĝojo ni ricevis mesaĝon de prezidanto de Albana E-Ligo Agim Peraj. Ni tre bedaŭras, ke kvankam en Albanio estas mezonda E-elsendo de nia Radio, tamen malmultaj estas niaj aŭskultantoj. Krome, ni volas konkrete scii de s-ro Agim Peraj pri la aŭskultstato de nia mezonda elsendo en Albanio. Ni kredas, ke dank' al la efika propagando de la prezidanto, ŝanĝiĝos la nuna situacio.)*

## Letero de Kazimierz Krzyżak el Pollando:


Mi kiel polo hontas por la pola registaro, kiu likvidis la esperantan redakcion de Pola Radio. Tamen dank' al multe da protestoj, ankaŭ ĉi tiu elsendo revenis.

Mi senĉese kredas, ke nur granda Ĉinio, kaj via Redakcio aparte kontribuos al tio, ke Esperanto estus la dua krom la nacia lingvo en la tuta mondo.

## Letero de Marian Laba el Pollando:

Mi admiras, kiamaniere vi kapablas majstre ampleksi tiom multe da laboroj, kiel prepari enhavoriĉajn programojn kaj imponan kvarpaĝan Mikrofone, trakti multajn leterojn de aŭskultantoj kaj tiel plu.

## Fotoj Senditaj de Chalm Alain el Francio:




Chalm Alain el Francio sendis al ni grupon da fotoj de la renovigita placo de Bulonjo ĉe Maro, faritaj de li dum la jubilea aranĝo pri 100 jaroj de UK en 2005. Li skribis, ke la nuna urboestro sukcese restrukturigis la malnovan placon kaj bone plenumis sian promeson.



# Tra la Mondo – 世界各地

## Konu MondEtur kaj kunlaboru kun ĝi

MondEtur estas nova "stelo" sur la Esperanta "ĉielo" kaj Esperanto-kompanio por zorgado kaj servado. Ĝi situas en la urbo Patajo, Tajlando, deziras per sia nombra agado pere de nia komuna lingvo pli larĝigi sinceran amikaron, ricevi rimedojn por normala homeca vivo.

Ĝia devizo - Esperantistoj helpas popolojn de la mondo. La kontaktadreso: info@MondEtur.net, zpehar@hotmail.com

*Laŭ informo de Zelimir Pehar*

## Invito al la jubilea jaro de Esperanto-Asocio en Finnlando

La 28-an de aprilo, 2007, 100-jariĝos Esperanto-Asocio de Finnlando. La centjara jubileo havos diversajn eventojn en la ĉefurbo: jubilean feston kaj jubilean bankedon. UEA-prezidanto Renato Corsetti vizitos tiam en Finnlando kaj partoprenos la aranĝojn. En somero estos la tradicia lingvokurso okazonta de la 23-a ĝis la 27-a de julio, 2007; sekve okazos la internacia festivalo "Arta Lumo" en la urbo Kuopio de la 27-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Post la festivalo estos rektaj flugoj de Finnlando al Japanio por tiuj, kiuj poste deziros viziti la 92-an UK en Jokohamo.

*Tiina Oittinen, sekretario de E-Asocio de Finnlando*

## 2750-jara Samarkando de Uzbekistano

En aŭgusto, 2007, urbo Samarkando oficiale kaj solene festos sian 2750-jariĝon, sub aŭspicio de UNESKO. Por celebrado la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro kaj loka E-klubo kolektas gratulleterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, poemojn, kantojn, fotojn pri Samarkando.



*Blazono de Samarkando*

La Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro estas senprofitcela neregistara organizo, konformita al universalaj homaj valoroj kaj celas firmigon de paco, interkompreniĝo kaj interpopola amikeco; pliprofundigon de konsciiĝo kaj kompreno de la globaj defioj kaj demonstron de la multkultura varieco de la homaro.

La plej interesajn materialojn ili publikigos en la landa gazetaro. Ĉiuj ricevitaj kontribuaĵoj estos agnoskitaj kaj eksponataj en la internacia ekspozicio en Samarkanda Ŝtata Muzeo.

Kontaktiĝu kun nia aŭskultanto Anatoli Ionesov, direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro. La adreso:

*P.O. Box 76, UZ - 140100*
*Samarkand*
*Respubliko Uzbekistano*

## Kenjo rifuzis la enirvizon de Dalai-Lamao

Laŭ informo de HeKo, Kenjo rifuzis la enirvizon de Dalai Lamao, kiu do ne povis partopreni la Mondan Socian Forumon en Najrobio.

Estas necese emfazi, ke la politiko de la ĉina registaro koncerna al Dalai-Lamao estas klara kaj konsekvenca. Se Dalai-Lamao konfesos, ke Taiwan kaj Tibeto estas ne apartigeblaj partoj de la ĉina teritorio, kaj promesos, ke li ne plu faros splitigan agadon,

la ĉina koncerna flanko ĉiam pretas kontaktiĝi kaj dialogi kun Dalai-Lamao pri lia estonteco. La pordo de Ĉinio ĉiam estas malfermita por Dalai-Lamao.

## Invito al la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto

Celebre al la centjariĝo de Brazila Esperanto-Ligo, okazos la 42-a Brazila Jubilea Kongreso de Esperanto en Rio-de-Ĵanejro de la 8-a ĝis la 13-a de julio, 2007. La ĉeftemo de la Kongreso: Cent jaroj de E-movado en Brazilo kaj strategio por la estonto. Dum la kongreso okazos prelegoj, artaj ekspozicioj kaj konkursoj, muzikaj prezentadoj, ekskursoj kaj aliaj.

*Fabiano Henrique*
*fabhenrique@bol.com.br*

## Saluto de la Semajno de Internacia Amikeco

Nome de la bolonjaj esperantistoj, sekretario de la E-Grupo "A. Tellini 1912", Italio, Mario Amadei nin ĉiujn tutkore kaj samideane salutas okaze de la 39-a SIA, en kiu ili tradicie aranĝas diversajn programerojn. Ĉiujare ni ricevas saluton kaj bondezirojn de niaj aŭskultantoj okaze de la SIA en diversaj lokoj.

## Amikeco trans limoj

La Semajno de Internacia Amikeco (SIA) ĉiu-jare okazas ĝenerale la okan semajnon de ĉiu jaro en februaro kaj nun fariĝis tutmonda tradicio de E-medio. Ĝin iniciatis Erik Carlen (Svedio) antaŭ 38 jaroj. La ideo pleje spegulas la esencan fonon de nia lingvo: Egaleco inter homoj kaj nacioj, solidareco inter ĉiuj gentoj kaj respekto al la homaj rajtoj.

## Komenciĝis en Hanojo E-kurso por 63-a IJK

La 13-an de januaro ĉi-jare, komenciĝis en Hanojo, trimonata Esperanto-kurso por la komencantoj de la Fremdlingva Universitato kaj Hanoja Ŝtata Universitato de Vjetnamio. Interalie, la Fremdlingva Universitato estos kongresejo de la 63-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, okazonta de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto ĉi-jare kun la temo: Paco, Kunlaboro kaj Disvolviĝo.

Pli ol 400 gestudentoj sin anoncis al la kurso. Post finstudo oni organizos ekzamenon kaj la 10 plej elstaraj estos rekomenditaj per senpaga aliĝo al la 63-a IJK, kaj la aliaj povos servi kiel volontuloj de la Kongreso.

La 7-an de januaro, ankaŭ en Hochiminh-urbo, suda de Vjetnamio, okazis Esperanto-kurso por komencantoj. Pli ol 10 homoj partoprenis en la kurso. Nuntempe en la Hochiminh-urbo ĉiudimanĉe okazas Esperanto-kurso.

*Zhu Xin el Vjetnamio*

## Tago de Esperanto-kulturo en Banjaluko, Bosnio



Esperantistoj en la tutmondo la 15-an de decembro festis kaj organizis diversajn solenaĵojn dediĉitajn al la kreinto de Esperarnto, Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Esperantistoj de E-societo "La Mondo" el Banjaluko, Bosnio, por tiu tago organizis Tagon de Esperanto-kulturo.

En gimnazio-Radojica estis organizita por gelernantoj kaj geprofesoroj prelego "Modernaj tendencoj en instruado de lingvoj kaj kultura edukado". Preleganto estis prof. Radojica Petrovic, prezidanto de ILEI. En la sama lernejo s-ro Mico Vrhovac gvidis E-kurson por komencantoj kaj post la kurso organizis E-sekcion

Pri Tago informis la plej legataj gazetoj de la Respubliko.

*Mico Vrhovac*

## Konu E-Grupon en Schwelm en Germanio



En la mondo ekzistas sennombro da E-grupoj, en kiuj vigle aktivas aŭskultantoj de Ĉina Radio Internacia. La E-Grupo Schwelm en Germanio estas unu el ili. Inter la grupanoj estas fidelaj aŭskultantoj de E-elsendoj de ĈRI Anton Kronshage kaj Heinz Schindler, kiuj ofte kunportas al aliaj informojn pri Ĉinio. Jen iufoja regula kunveno de la Grupo.

*Anton Kronshage*

## Piedvojaĝo de Italio al Japanio kaj reen

Marino Curnis, itala esperantisto, kiu estas vojaĝanta piede, de Italio al Japanio kaj reen, por kunporti kun si mesaĝon de paco.

*Andrea Fontana*

## Kondolenco al Krystyna Babian

Laŭ informo de Alexandra Smulkowska el Pollando, nia konstanta aŭskultanto Krystyna Babian forpasis la 29-an de novembro, 2006. S-ino Krystyna Babian aŭskultis nian elsendon de la okdekaj jaroj en la pasinta jarcento. En pli ol 20 jaroj, ŝi partoprenis preskaŭ en ĉiuj niaj konkursoj kaj plurfoje gajnis premion. Siatempe ŝi estis laborema kaj bone edukita instruistino. Ŝi amis Ĉinion kaj la ĉinan popolon kaj ege interesiĝis pri la ĉina lingvo kaj la tradicia ĉina muziko.

*(Ni ege bedaŭras, ke ni perdis eminentan aŭskultanton! Ni esprimas nian profundan kondolencon al ŝi kaj intiman konsolon al ŝiaj familianoj. )*

# MIKRONOVELO – 微型小说



## *Pedikuristo*

Agui, filo de onklo Fa, forlasis la vilaĝeton Xiaoyan kaj veturis al la urbo Shenzhen por lukrado.

Antaŭ la Printempa Festo, li revenis, surhavante eŭropastilan kostumon, brunajn ledŝuojn kaj... kaj plej okulfrape estis, ke li aspektas kiel apaĉo pro ebone nigraj kontraŭsunaj okulvitroj, kio kaŭzis malfavoran komenton en la vilaĝo.

En la novjara tago, kiam geknaboj iris al la hejmo de Agui por saluti lian patron, li disdonis al ĉiu almenaŭ unu juanon. Pro tio vilaĝanoj vidis lin jam ne huligano, sed riĉa mastro, kaj komencis proksimiĝi al li.

Agui, kion vi faras en Shenzhen? Oni provis eltiri la kaŭzon de lia riĉiĝo. Tamen li nur ridetis, anstataŭ doni respondon. Eĉ lia patro ne sciis, kian okupon li havas. Tute egale, ĉiu en la vilaĝo portis 200-procentan certecon pri tio, ke li efektive riĉiĝis.

200-procente pravis la diveno de la vilaĝanoj. En la 5-a novjara tago, Agui petis, ke onklo Fa veturu al Shenzhen por rigardi la eksteran mondon, tamen lia patro ne volis.

"Iru, paĉjo! Vi, jam tiom aĝa, ne havus plu tian okazon, se..." Agui insistis .

"Ne! Ne!"

"Sekvu min! Nepre! Mi ne faras malbonon tie."

Lumeto penetris la koron de lia patro.

Post instigado kaj persvadado fare de najbaroj, onklo Fa sekvis sian filon al Shenzhen.

Kia urbo, multakolora, paradiza! Agui gvidis la patron al kelkaj vidindaĵoj. Poste li instruis, kiel la patro transiru straton kaj revenu al la hejmo; kaj li foriris al sia laboro. En la 1-aj tagoj onklo Fa tute ne kuraĝis forlasi ĉambron de la filo. Starante ĉe ĝia pordo, li ĝue rigardis paŝantojn, aŭtojn kaj ion alian, de li neniam viditan. Post kelkaj tagoj li fariĝis iom aŭdaca. Li eliris kaj ekvagis laŭ stratoj; kaj liaj okuloj pli kaj pli viglis.

Agui, ege okupita, jam ne havis tempon por akompani la patron. Li pretigis por onklo Fa la 3 manĝojn en ĉiu tago. Li frue eliris en mateno kaj tarde revenis en vespero.

En iu tago onklo Fa ekmigris pli malproksimen, al vivoplena loko. Subite li vidis, ke iu brakume tenas la piedojn de sidanta grasulino, kiu eĉ ĝue fermetis la okulojn. Scivolo pelis lin tien kaj li staris flanke. La brakumanto absorbite flegis la piedajn ungojn de la grasa virino, per delikata tranĉilo. Ĉiun ungon tiu brakumanto eĉ iom fajlis kaj ŝmiris per ruĝa oleo, tiel ke ĉiuj ungoj aspektis tre ĉarmaj kaj freŝaj. Ankaŭ onklo Fa absorbiĝis, ĉar tion li unuafoje en la vivo spertis. Pasis proksimume 10 minutoj. La grasulino donis 20 juanojn kaj tiu riverence dankis ŝin. Kiam tiu sin turnis, onklo Fa klare vidis, ke tiu estas lia filo Agui.

Al la filo li donis 2 vangofrapojn. "Hejmen! Tuj! Al nia vilaĝo! Labori sur nia kampo!"

***Yang Chongde***



# Anonceto



Saluton, karaj amikoj! Shanshan (ĉina nomo), Eŭfonia (Esperanto-nomo), respondeculino de la programero Leterkesto, ĉi tie faras anonceton al vi. Ĉu ekzistas interesaj aferoj ĉe vi? Ĉu vi volas prezenti vin mem al niaj aŭskultantoj? Ĉu vi estas iom ĉagrenita aŭ ĝoja kaj volas dividi vian senton kun aliaj? Ĉu vi havas novaĵojn pri Esperanto (ekz. vi faris Esperanto-filmon, malfermis Esperanto-kurson, aŭ bakis novan esperantiston, ktp)? Ĉu vi interesiĝas pri ĉinaj kulturoj aŭ kurantaj aferoj kaj volas detale koni ilin? Ĉiuj temoj estas taŭgaj kaj bonvenaj. Se vi volus interbabili, bonvole leteru al mi laŭ jena ret-adreso: eufonia@saluton.net kaj lasu vian telefonnumeron al mi. Poste, mi telefone faros intervjuon (precipe interbabilon) al vi! Sincere via, Shanshan, Eŭfonia (Kiun nomon mian vi preferas? La ĉinan Shanshan, aŭ la Esperantan Eŭfonia? Bonvole mem elektu, oportunige al nia intima kontakto en la estonteco!)

# Nova retejo por nova jaro

Karaj legantoj, en la nova jaro, la plej grava afero por nia redakcio kaj la E-elsendo estas renovigi la version de nia retejo. Tio alportos ŝancon kaj defion al ni kaj la estonta laboro.

Post preskaŭ duon-jaraj atenta diskutado, desegnado kaj projektado, la renoviga laboro oficiale eniris en esencan etapon. Ĉi-foje la E-retejo dispoziciis kanalojn pri Vivo kaj Turismo, Kulturo kaj Amuzo, Sporto, Ekonomio kaj E-klubo kaj pri ĉiuj flankoj atentataj de retumantoj. En la nova retejo iuj programeroj estas nur akireblaj surrete. En la pasintaj du jaroj, retejoj de 11 ĉefaj fremdlingvoj de Ĉina Radio Internacia plenumis renovigon de versio, la E-retejo estas la 12-a kaj la unua inter malgrandaj fremdlingvaj retejoj.

Krom riĉa enhavo kaj nove desegnitaj kanaloj, la alia plej brila karakterizo de la nova retejo estas ĝiaj stilo kaj aspekto. La nova versio havas plej modernan desegnon kaj la dispozicio de kanaloj kaj rubrikoj estas pli racia kaj konforma al kutimo de retumantoj.

La plej granda nova funkcio de nia nova retejo estas podkasto. Ĉi-foje la E-retejo estas la 5-a retejo kiu liveros podkastan servon. Se vi scipovas uzi iujn softvarojn pri surbendigo, do vi povos produkti videon aŭ aŭdon por nia retejo. La tuta funkciiga surfaco uzas Esperanton, tio estas aparte desegnita por esperantistoj. Pri ĉiuj videoj kaj aŭdoj, vi ankaŭ povos fari komenton aŭ interflui opiniojn kun aliaj. Sekve de multiĝo de uzantoj, ni multigos aliajn riĉajn funkciojn.

Nia retpaĝo ŝanĝiĝos, sed nia retadreso ne, kiu estas http://esperanto.cri.cn. Bonvole atendu kune kun ni naskiĝon de la nova E-retejo, kaj senhezite klaku laŭ la adreso http://esperanto.cri.cn, ni montros al vi la miraklan E-mondon.



Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



CRI Online
Esperanto

http://esperanto.cri.cn

（2007年第一期 总第17期）

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn
Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040